

## Zamenhof-Tago en Ljubljana

Celebrado de tiel nomata Zamenhof-Tago, kiu kunigas la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto, la Tagon de homaj rajtoj kaj la Tagon de Esperanta Libro, estas ĉe ni longjara tradicio. Tiam, en la tempo de jarfino, kunvenas tiel la plej aktivaj esperantistoj kaj amikoj de la Esperanta movado kiel ankaŭ tiuj, kiuj nur malofte aliĝas al niaj rekontiĝoj. Ĉar ĉiokaze emfazo fokusiĝas je malstreĉa kuniĝado, ĝi estas krom la jarkunveno la plej ŝatata aranĝo de niaj societoj kaj de la Slovenia Esperanto-Ligo. Ankaŭ ĉijare ni aranĝis du solenaĵojn en malsamaj tagoj en Ljubljana kaj Maribor, por tiamaniere mallongigi la vojon al partoprenantoj kaj ebligi ilin laŭ deziro viziti ambaŭ solenaĵojn.

En Ljubljana ni ĉifoje rekontiĝis kaj festis la tri tagojn sabaton, la 5-an de decembro je la 10-a horo en Štefan-strato 11. Kolektiĝis 16 personoj el la tuta Slovenujo. En solene ornamita halo ni plenumis la sekvan programon:

- Saluto kaj alparolo (Nika Rožej, Janez Jug)
- Kantado de la esperanta himno kaj de la Eŭropa himno en Esperanto
- Recito de la nova traduko de balado de Anton Aŝkerc (Tomaž Longyka)
- Vortfarado en Esperanto (Janez Jug)
- Du popolkantoj slovene kaj esperante (Metka Ŝtok)
- Motivado por esperantaj aktivecoj (Ostoj Kristan)
- Instruado de Esperanto en la Elementa lernejo Anton Ukmar en Koper (Peter Grbec)
- Ankoraŭ unu popolkanto slovene kaj esperante (Metka Ŝtok)
- Translokiĝo en la salonon.

Por himnoj kaj popolkantoj estis al dispono notoj kaj tekstoj, en la slovena aŭ/kaj en Esperanto. Ĉiu partoprenanto ricevis ankaŭ skribmaterialojn por kompletigi la prezentaĵon de la motivado por Esperantaj aktivecoj. La prelegojn pri vortfarado en Esperanto kaj pri instruado de Esperanto en Koper, kiuj estis prezentitaj esperante, la prelegantoj akompanis per projektado de bildoj kaj teksteltiroj sur la muro.



Ostoj montris ankaŭ la afiŝon kun slovena teksto okaze de la Tago de la esperanta libro

Tomaž Longyka, kiel la unua prezentado, recitis sian plej novan tradukon de baladoj de Anton Aŝkerc, kio restas lia amata temo. Ĉifoje li ĉarmis nin per eleganta Esperanta reverko de *La dumnokta pasaĝerino*, balado, kiu jam per nura temo altiras atenton de junuloj kaj maljunuloj, sed la tradukisto aldone plezurigis nin per sia interpreto de la poemo, kiun li recitis sentoplene, verve, eĉ pasie.

Ĉar li ne sukcesis traduki por ĉi tiu aranĝo du baladoj de Aŝkerc, kiel li estis planinta, Tomaž aldonis ĝis nun nepublikigitan poemon, kiun li verkis antaŭ ok jaroj en sia ĉambro de la hotelo Jowita en Poznano kaj dediĉis ĝin al sia studkolegino Jurate el Litovio okaze de ŝia diplomekzameno.



Tomaž Longyka



Metka Štok

Speciala gastino de la aranĝo estis pop- kaj ĵazo-kantistino Metka Štok. Renoma ankaŭ kiel ŝansonkantistino, ŝi eĉ sen muzikinstrumenta akompano per sia profunda kaj lerta voĉo komence direktis nian senpretendan kantadon de himnoj, kaj poste ŝi virtuoze kantis kelkajn popolkantojn slovene kaj interpretis ilin ankaŭ en Esperanto. Ni kun verve kunkantis la esperantajn tekstojn de *Fratoj tre gajaj ni* (Bratci veseli vsi), *Ho, kiel mi amus* (Kako bom ljubila) kaj *Monteton aĉetos mi* (En hribček bom kupil). Kaj nia kantado estis surprize harmonia.



Janez Jug sekvis la originajn instrukciojn de L. L. Zamenhof

Ankaŭ ĉiuj tri fakaj prelegoj altiris atenton kaj diskuton de geĉeestantoj. La tekstoj en redaktita formo estos al dispono ankaŭ al alia publiko per aperigo en la bulteno *Informacije / Informoj* kaj en ttt-paĝaro de SIEL. La prelego pri esperanta vortfaradomontris, ke ĉe akceptado de novaj terminoj kaj ilia uzado oni devas konsideri bazajn principojn de Esperanto kaj ke oni devas senĉese sekvi lingvajn

gvidliniojn kaj instrukciojn de Akademio de Esperanto. Tro granda libereco kaj nekonsekvenceco en la vortfarado povas malutili al la evoluo de Esperanto. La klara raporto pri motivado por esperantaj aktivecoj atentigis nin pri malfortoj kaj elvokoj en la esperantista movado.. La prelego oferis kelkajn klasikajn kaj pli modernajn ilojn por pli sukcesa efektivigo de laborprogramoj, interalie detale ellaboritan skemon kun taskoj, terminoj kaj devontigoj, kaj personan afiŝon »Ĉiutage 5 minutojn por Esperanto«. La prelego pri la instruado de Esperanto en Elementa lernejo Anton Ukmar en Koper prezentis utiligeblojn kaj eblojn de la reta aplikaĵo Duolingo kaj esperigajn efikojn por la motivado kaj lernprogreso rilate al lingvoscio de gelernantoj. Tiu sama lernado malgraŭ la simpla kaj amuza metodo postulas pensadon en tri lingvoj kaj sendependan serĉadon de la plej bonaj solvoj.

Unu horo kaj duono da celebrado pasis nesenteble rapide kaj la translokiĝo en la salonon ne haltigis viglan debaton. Tie oni preparis modestan gastigon por diversaj gustoj: hejme faritan vinon, senalkoholajn trinkaĵojn, fruktojn, delikataĵojn, hejme faritajn kukojn kaj frandaĵojn. Oni multe babilis, ĉar ĉiufoje estas inter ni kelkaj novaj vizaĝoj, ankaŭ ĉifoje, kaj ekkono de novaj amikoj estas precipe multvalora.



Decembro estas ĝusta tempo por aĉeti donacetojn kaj specialajn poŝtmarkojn

Kiel kutime vendiĝis esperanta literaturo kaj personaj poŝtmarkoj (eldono rilate la 90-a jubileo de Esperanto-Societo Ljubljana, nur kelkaj ekzempleroj estas ankoraŭ aĉetebblaj!). Oni ankaŭ povis pagi la membrotizon.

Je la fino ni deziris unu al alia belajn festotagojn kaj feliĉan novan jaron 2016.

Ostoj Kristan